# El liberecana vidpunkto

2

2008/10


- CGT: Rezolucio pri la 7a de oktobro
- La labora deĵordaŭro
- CNT: Malapero de la sindikata libero en Francio
- For la gvidlinio pir 65 horoj
- La EU por kio? por kiu?
- CGT: Internacia alvoko


## NE AL LA GVIDLINIO PRI 65 HOROJ SEMAJNE



La krizon pagu riĉuloj

Ne al la gvidlinio pri returniro de la enmigrantoj



## *Tuteŭropa laboristaro mobiliziĝu kontraŭ la Eŭropo de la kapitalo*

Esperantigitaj elĉerpaĵoj el liberecanaj gazetoj

# Rezolucio pri la "striko" dum 15 minutoj de la tuja 7a de oktobro

## *Ĝenerala Konfederacio de la Laboro*

Reage al la alvoko de striko dum 15 minutoj apogita de la ESK (UGT kaj CCOO) en Hispanio) kontraŭ la EUa gvidlinio pri ampleksigo de la labora deĵordaŭro ĝis 65 horoj, la Plenkunsido de la Konfederacia Komitato de la CGT **MANIFESTAS**:

1. La alfrontan kontraŭstaron de la CGT kontraŭ tiu ĉi mezuro, kiu klopodas neniigi la atingaĵojn de la luktoj kaj depostuloj de la laborista klaso dum jarcentoj. Tia agreso supozas gravegan atakon kontraŭ la laboraj kondiĉoj de la laborista klaso entute kaj malprogreson de la socio, kiu kondukas nin al stato, similanta tiun de la 19a jarcento.

2. Ke la CGT ne aliĝas al la alvoko, ĉar ĝi taksas, ke la alvokantaj sindikatoj de la ESK en Hispanio estas kunkulpuloj pri la aprobitaj politikoj kontraŭ la gelaboristoj kaŭze de la senĉesaj paktoj kaj silentoj, kiujn ili tenadas antaŭ la agresoj al la laboraj rajtoj ĉe la eŭropa kampo.

3. Ke la CGT realigos daŭrajn **mobilizajn kampanjojn** kontraŭ tiuj ĉi agresoj ĉe ĉiuj frontoj: ĉe ĉiuj entreprenoj, kun la tuta laborista klaso kaj antaŭ la tuta civitanaro. Samtempe ĝi postulos en la kolektivaj kontraktoj la enkondukon de klaŭzoj, kontraŭstarantaj la aprobitajn eŭropajn gvidliniojn, **postulante la deĵordaŭron de 35 horoj semajne, la firmigon kaj reakiron de la sociaj publikaj kaj bonkvalitaj servoj, cele al ties rekta administrado fare de la publikaj administracioj kaj al la defendo de la sociaj kaj laboraj rajtoj**.

4. Ke la CGTaj kampanjoj, kiuj komencis je septembro, disvolvados ĉe ĉiuj laboraj centroj kaj urboj de la tuta hispana geografio, por kunfluiĝi en protesta **koncentrado** antaŭ la **Ministrejo pri Laboro la venontan 3an de decembro**. Samtempe ni laboras por realigi depostulantajn kaj *mobilizigajn agadojn ĉe la eŭropa kampo* por kunfluiĝi kun aliaj organizaĵoj en unuiga ago dum la 2009a printempo. Ni ne flankenigas la eblon de **ĝenerala striko**, se la socio petas ĝin.

5. Ke la CGT traksas tiun ĉi alvokon kiel nuran maskon por kaŝi la kunkulpon de tiuj ĉi sindikatoj pri la nuna labora situacio kaj aperi antaŭ la socio kiel defendantoj de la rajtoj de la gelaboristoj, kvankam tage post tage ili stimuligas la perdon de laboraj rajtoj per la kolektivaj kontraktoj, kiujn ili signas. Per iliaj agoj malebligas la unuiĝon de la laborista klaso, hodiaŭ ili alvokas striketon, sed morgaŭ ili signas laboran reformadon, kiu malpliigas la garantiojn de la plejmulto el la laboranta loĝantaro.

Tamen la CGT ĉiam repektis la individuan agadon de sia aliĝintaro rilate de la aliĝo al alvokoj, realigitaj de aliaj organizaĵoj, se ĝi kredas, ke kun ĝia apogo oni defendas la ĝeneralan intereson de la laborista klaso.

# Labora deĵordaŭro
## La EUa gvidlinio pri maksima labortago
### *Desiderio Martín*

La Gvidlinion 2003/88/CE de la Eŭropa Parlamento kaj la Konsilantaro, de la 4a de novembro de la 2003a, tuŝanta iujn flankojn de la normigo pri la labordaŭro, oni klopodas modifi per nova gvidlinio, ampliksiganta la maksimuman deĵordaŭron ĝis 60 horoj semajne aŭ 65 por tiuj, kiuj estas en stato de disponeblo por labori (deĵoroj), kiel la specifa okazo de la kuracistoj.

La Gvidlinio 2003/88 normigas la minimumajn ĉiutagan ripozon, la ĉiusemajnan ripozon kaj feriojn, la paŭzojn kaj la maksimuman daŭron de la ĉiusemajna laboro kaj ankaŭ iujn flankojn de la dumnokta laboro, la deĵoralterna laboro kaj la labortakto (art. 1.2).

Tiu estas gvidlinio aplikebla sur ĉiuj agantaj sektoroj –krom la maristaro–, ĉu publikaj aŭ privataj.

Ĝi starigas devigan ĉiutagan ripozon dum 11 sinsekvaj horoj po ĉiu 24-hora periodo (art. 3).

Same ĝi starigas minimuman ĉiusemajnan ripozperiodon el 24 sinsekvaj horoj, al kiuj oni aldonu la ĉiutagajn 11.

Kaj la 6a artikolo fiksas la maksimuman ĉiusemajnan deĵordaŭron, starigante per sia paragrafo b), ke "la averaĝa labordaŭro ne surpasu la 48 horojn, inkluzive de tiuj eksterordinaraj, je ĉiu 7-taga periodo".

La malfacilaĵoj aperas ĉe la kielo permesi la daŭrofleksiĝon en la kalkulo pri la minimumaj ripozoj tiel ĉiutagaj kiel ĉiusemajnaj. Tiel la 16a artikolo starigas referencperiodojn, kiuj, aparte por la ĉiusemajna ripozo (24 horoj), estas fisksataj al 14 tagoj kaj, por la ĉiusemajna labordaŭro (48 horoj) al kvar monatoj. Kaj la 17a, 18a, 19a, 20a kaj 21a artikoloj starigas esceptaĵojn, per kiuj la ŝtatoj membroj rajtas pliampleksigi la maksimumajn kalkulajn periodojn tiel por la ĉiusemajna ripozo kiel por la ĉiusemajna deĵordaŭro, kaj listigas amason da agadoj, en kiuj la fleksigado povas esti surpasita kaŭze de teknikaj, objektivaj aŭ necesaj kialoj (kuracistoj, poŝtservo, energio, telekomunikado kaj senfina kotopo).

Aldone malfermiĝas la vojo al la "volonteco" de la laboristo por "libere" pakti labori pli ol 48 horojn semajne kun la entreprenisto.

La pliampleksigo ĝis 60/65 horoj de ĉiusemajna laboro estas nenio krom plia plistreĉigo de tiu senĉesa troekspluatado de la laboro, ĉi-foje per ampleksigaj rimedoj (pligrandigo de la labordaŭro je dispono de la entrepreno), aŭ alivorte "disponeblo por la dungo, kiu ajn dungo, t. e. la vivtempo perdas sian signifon, se ĝi ne estas tempo dediĉata al la valorigo de la kapitalo" (Andrés Bilbao).

La "nova" gvidlinio pri deĵordaŭro ne malmoligas sian fleksebligan fundamenton, krome de la pliigo en laboraj horoj, ĉar tiu de la 2003a enhavas ĉiujn kategoriojn de la sennormigado: la labortempo estas fleksiĝita laŭ la produktbezonoj (la surmomentaj (*just in* time) sistemoj, kiuj implicas la foreston de stokoj, eroj, vicpecoj ktp kaj produktas nur sur mendo; la triaj kaj kvaraj deĵoralternoj; la deĵordaŭroj kalkulataj kvarmonate kaj senfino el variantoj estantaj ĉe la novaj sistemoj de produktado kaj de administrado sur la produktforto) kaj la protektaj limoj (deviga leĝaro) febliĝas ĝis la punkto, en kiu la "individua volo" regas la sociajn rilatojn, malaperigante la "protektan" garantion de la prilabora leĝaro.

# Tuja malapero de la sindikata libereco en Francio: NKL-F antaŭ la reformigo de la sindikata rajto

**Je la tempo de la reformigo de la reprezenteco ŝajnas oportune al ni reiri al tiom priparolata temo. Kio estas la reprezenteco? Kion implicas ĝi? Ĉu estas ŝanĝonta la eblo debati, kontesti, vivi ene de la entrepreno? Nuntempe la registaro deziras defini denove tion, kiu sindikato rajtas ĉeesti la entreprenon kaj kiuj aliaj ne rajtas.**

Kvankam laŭ NKL (Nacia Konfederacio de la Laboro) apartenas al la laboristoj elekti kiel ili deziras organiziĝi, la subpremado devigas nin noti ankaŭ la leĝan kadron, por ke sindikatista laboristo ne estu samsignifa ol maldungita laboristo.

Se tiu ĉi reformigo gravas por ĉiuj laboristoj, kaj sekve por la NKL, estas samgrava la komprenon pri la nova ekvilibro, kiun la registaro klopodas starigi. Ĉu eble la evoluo de la entrepreno estas praulo de la evoluoj de la Respubliko?


Memkompreneble. Alivorte respubliko “respektanta la resplublikanajn kriteriojn”. Kaj kio estos el tiuj, kiuj pensas, ke tiu respubliko starigita sur malrekta demokratio estas nenio krom kaŝita diktatorado? Kio okazas al ĉiuj formoj el revoluciaj pensoj? Leĝo pri reprezenteco silentiganta ĉiun formon de meditado pri la radiko de la problemoj, tio estas, kion trudas al ni la registaro.

## Antaŭ ol la reformigo

La kadro estas la reprezenteco kaj sekve tio signifas por ni la eblon krei sindikatan sekcion ĉe la entrepreno, akiro de la 68a majo. La sindikata delegito havas la povon negocii, sed li estas elektita kaj senoficigita de la sindikato. Kaj tio kongruas sufiĉe kun anarĥisindikatisma organizaĵo kiel la NKL. Uzi la laŭleĝan kadron, atingi la reprezentecon, ne signifas nepre fali en kompromisojn, kiuj finiĝu malplenigante la sindikatismon el batalemo. Tial dum la 15 tagoj post la nomumo de NKLa sindikata delegito mulfoje ni estis denoncitaj de la mastro kaj eĉ de aliaj sindikatoj, kontestantaj nian reprezentecon.

Ĝis nun nursole CFDT, CFTC, CGT, CGC kaj FO estis taksitaj reprezentecaj kaj ili ne povis esti kontestataj, eĉ se ili havus unu solan aliĝinton.

Por la aliaj, kiel por NKL, ekde la fino de la 2a tutmonda milito nepris, okaze la nomumo estis kontestata (de la mastro aŭ de “reprezenteca” sindikato), demontri ilian reprezentecon per plenumo de iuj kriterioj: la rimedoj, la sendependo, la aliĝkotizoj, la sperto kaj antikveco de la sindikato, la patriema sinteno dum la [nazia] okupado kaj la sekvantaro ligita al la rezultoj de la laboraj balotadoj, kiu estos findeĉida ĉe la reformigo.




## Kadro notinde modifita de la reformigo

La registaro *Chirac-Villepin* kaj la posteuloj *Sarkozy*-anoj ekskuigis la sistemon per komenco de intertraktoj, en kiu ĉiu sindikato reliefigis la por si plej favoran kriterion: la “prud-

homaj" (laboraj, kun mastraj kaj sindikataj juĝistoj) elektoj kaj la publika administrado por SUD, la socia sekureco por FO, la kotizoj kaj agado por CFTC…

Sed ĉiujn ilin surpasis la CFDT kaj la CGT, kiuj intertraktis kun la MEDEF (la mastraro) kaj la CGPME (Ĝenerala Konfederacio de la Malgrandaj kaj Mezaj Entreprenoj) la "komunan sintenon", sur kiu sinbazas tiu nova leĝo. Tiu ĉi difinas la novajn kriteriojn pri la reprezenteco: la respekto pri la respublikanaj valoroj, la sendependo, la financa travideblo, du jaroj de servodaŭro ĉe la profesia kaj geografia kampo de la entrepreno, la sekvantaro, la influkapablo, montrita ĉefe de la agado kaj la sperto, la aliĝintaro kaj la kotizoj.




Plursenca estas la kriterio pri la respekto al la respublikaj valoroj: neniu scias, ĉu temas pri filozofia respekto, ideo pri libero, pri toleremo, kio okazis ĉe la leĝprojektoj, aŭ pri respekto al la nuna socia ordo, kio implicus la flankenigon de la NKL de la franca sindikata panoramo. Finfine la leĝo ne klarigas tion, la juĝistoj devos ekzameni la aferon.

La kriterio pri la financa travideblo devigos la NKLajn sindikatojn esti pli sistememaj kun ilia kontotenado. La "sekvantaro", t.e. la balotaj rezultoj, estas la ĉefa kriterio de la reformigo: por esti reprezenteca ĉe la en-




trepreno, la sindikata sekcio bezonas plenumi la aliajn kriteriojn kaj atingi 10% ĉe la unua rondo de la balotoj pri la membroj de la entreprena komitato, aŭ siavice de laborista delegito. Ĉe la sektora kampo estas atingenda averaĝe 8% de la rezultoj ĉe la industribranĉo kaj havi "ekvilibran teritorian enplantiĝon". Interprofesie nepras atingi 8% el la rezultoj de ĉiuj entreprenoj kaj esti reprezenteca en sektoroj de la industrio, la konstruado, la komerco kaj la servoj.

Ĉe la entrepreno la sindikata delegito devas esti nomumita inter la kandidatoj atingantaj almenaŭ 10% ĉe la unua rondo. La aŭtonomeco de la sindikata sekcio estas damaĝita, ĉar ĝi jam ne rajtas elekti libere sian sindikatan delegiton. La intertraktaj normoj ankaŭ estas modifitaj: pakto inter sindikata organizaĵo kaj mastraro, por validi, devas esti signata por la sindikatoj, sumantaj 30% de la voĉdonoj, kaj ne esti kontraŭstarata de sindikatoj, atingantaj pli ol la 50% de la voĉdonoj.

Krom la ĉefeco donita al la balotado, grava novaĵo de la reformigo estas la nova mandato de reprezentanto de la sindikata sekcio. Laŭ tiu nova mandato la sindikata sekcio rajtas stariĝi tuje (kun almenaŭ du aliĝintoj, la sendependo, la du jaroj de servodaŭro kaj la respekto al la respublikaj valoroj), kio permesas disdoni informaĵojn, alŝuti afiŝojn, ktp, kun protektata sindikata delegito, kvankam li

ne rajtas intertrakti. Je la sekvanta balotado ĉu la sekcio atingas reprezentecon aŭ la sindikata reprezentanto perdas sian mandaton kaj no povas esti denove nomumita ĝis 6 monatoj antaŭ la sekvaj balotadoj (kiuj ekde nun okazos ĉiu kvar jaroj).

Tiun ĉi reformigon oni voĉdonos kaj plublikos plej eble en aŭgusto. Ĉe la sektoraj kaj profesiaj sindikatoj la kalkulojn oni faros post kvin jaroj kaj dume restas la "klubo de la kvin" reprezentecaj. Ĉe la entreprenoj la nunaj delegitoj, ĉu SD (sindikata delegito), LD (laboristara delegito) aŭ EK (entreprena komitato), daŭras ĝis la venonta balotado, kiun starigos la reformigo. Dume la reprezentantoj de sindikata sekcio povas esti nomumita de la "ne reprezentecaj" sindikatoj.

**Nova fazo de integriĝo por la sindikatismo**

Kiel jam asertis iuj sindikatoj, la sekvo estas, ke post kvin jaroj la "klubo de la kvin" estos mortinta kaj ĉiuj sindikatoj estos teknike ĉe sama nivelo (eĉ se ili daŭras *multe malpli egalaj antaŭ la subpremado*). Oni rajtas spekulativi pri la restarigado de la sindikatan povon, kion tiu ĉi reformigo okazigos, ekzemple la UNSA jam parolas pri alianco kun CGT. La CFDT kaj la CGT memkompreneble altrudiĝos antaŭ la pli malfortaj sindikatoj –kaj tia estis la celo. Sed oni rajtas kritiki ankaŭ la sintenon de sociajn organizaĵojn, kiuj akceptas, ke la ŝtato prifosos iliajn kontojn (nek la kontoj nek la reprezenteco de la mastraro estas tuŝitaj de la reformigo), la fakton elekti tiun, kiu estas reprezenteca aŭ ne kaj eĉ elekti anstataŭ ili la sindikatan delegiton (kies nomumo antaŭ estis libera kaj kiu nun pasas por kandidato atinganta la 10% en la balotado).

LISEZ & SOUTENEZ !
LE COMBAT SYNDICALISTE
MENSUEL DES SYNDICATS CNT

Antaŭ ĉio oni devas malkvietiĝi ĉiufoje, kiam la ŝtato volas normigi la agadon de tiuj, kiuj supoze kontraŭstaras ĝin kaj kiujn la ŝtato frapas per klabo. Antaŭ ĉio tiu ĉi reformigo celas renovigi la sindikatan burokrataron, por ke ĝi estu pli laŭrajta kaj pli taŭga akompani la socian malprogreson je ĉiuj tavoloj de la intertraktatoj, ĉar ĉiam pli kaj pli la paktoj estas senvalidigantaj kaj malprogresemaj. La celo estas ŝpari ektimigojn kiel tiuj de la 1995a aŭ la 2006a kaj dresi klason de sindikataj reprezentantoj, profesiaj, disigitaj el la bazoj, kaj doni al la "amaso" la senton pri tio, ke oni faras por ĝi kaj ke ĝi povas dormi trakvile –aŭ naŭziĝi pri la sindikatoj, kiam ĝi rimarkos, ke ili trompis ĝin.

Entute tiu ĉi reformigo, bazanta la reprezentecon sur la balotado, celas tion, ke la laboristoj estu tiel pasivaj kiel la 60 milionoj, kiuj agas politike dum horkvarono ĉiu kvina jaro, kiam ili vizitas la balotcentrojn.

Por la sindikata movado ĝi estas nova kaptilo, sed kiu ajn estu la institucioj, starigataj por regi la ekspluatatojn, estas en la propra agado de la movado kaj en ties sendependa organizo, kie oni povas trovi forton. Por NKL tiu ĉi nova leĝa kadro ne estas forgesebla kaj, eĉ se ĝia strategio pri disvolvado estas ligata al multaj aliaj faktoroj findecidaj por la laboristaro, ĝi nepre atentu pri tiu nova leĝa kadro, ekzamenu ties avantaĝojn kaj malavantaĝojn, kaj elektu la sintenon, kiu plej bone ebligos ĝin disvolviĝi sen deflankiĝi de la praktiko por si fundamenta: la rekta agado, la sendependa lukto de la laboristaro kontraŭ la ŝtato, la mastraro kaj kiu ajn burokrataro.

CNT CONFEDERATION NATIONALE DU TRAVAIL
SYNDICAT DE COMBAT ! AUTOGESTIONNAIRE ET SANS PERMANENT !

# For la gvidlinio pri 65 horoj!

## Ili volas malantaŭenirigi nin unu jarcenton!

## La krizon pagu riĉuloj kaj bankistoj!

*Kampanjo kontraŭ la gvidlinio de la 65 horoj (no65hores@llistes.moviments.net)*

- Manifestacio alvokita por la mardo 7a de oktobro je la 18:30 horoj ĉe Barcelono ekde la *Passeig de Gràcia* ĝis la *Plaça Catalunya* sub la moto "Ne al la 65 horoj, jes al la 35 horoj. La krizon pagu riĉuloj".
- 24-hora strikalvoko realigonta ĉe la teritorio de Katalunio por la 7a de oktobro por doni leĝan kovrilon al ĉiu gelaboristo, deziranta realigi iun ajn strikon dum la tago. Ĉe ĉiu entrepreno oni decidos la daŭron de la striko kaj la informajn agojn realigontajn.

**Kion starigas la gvidlinio?**

La ĵuspasintan 9an de junio la Ministroj pri Laboro de la Eŭropa Unio aprobis, sen unu sola kontraŭa voĉdono, "modifproponon" pri la nuna gvidlinio pri la deĵordaŭro. Per tio ili ekirigis procezon, kiu finiĝis per la voĉdonado de la Eŭropa Parlamento je la venonta 19a de decembro.

Laŭ la nova gvidlinio la ŝtatoj povos ebligi pliampleksigojn de la deĵordaŭro ĝis 60-65 horoj semajne, aplikeblaj per individuaj paktoj inter entreprenisto kaj laboristo, kvankam la kolektivaj kontraktoj fiksus pli malgrandajn deĵordaŭrojn. Tio signifas reiri al "laŭleĝaj" deĵordaŭroj el 10 ĝis 12 horoj ĉiutage kaj 6 tagoj semajne. La propono de gvidlinio ankaŭ starigas, ke la ripozperiodoj dum la deĵoroj de kolektivoj kiel fajroestingistoj aŭ sanitaruloj jam ne estu taksitaj kiel labortempo.

**Kial nepras faligi tiun ĉi fifaman proponon?**

1. Ĉar ili volas malantaŭenirigi nin unu jarcenton, senvalidigante la maksimuman semajnan deĵordaŭron el 48 horoj, kiun la Internacia Organizo de Laboro oficialigis la 1917-an jaron post peniga kaj longa batalo de la internacia laborista movado.

2. Ĉar, klopodante altrudi la pliampleksigon de la deĵordaŭro per individuaj paktoj, ili atakas iun el la plej gravaj atingoj de la sindikata lukto: la rajto de la gelaboristoj al la kolektiva reprezento kaj intertraktado, forlasante la gelaboristojn sub la povo de la entreprenistoj.

3. Ĉar, kiam ili sendas milojn da gelaboristoj a la sendungeco, anstataŭ malpliigi la deĵordaŭron (ekkomencante per la 35 horoj) aŭ malpliigante la emeritaĝon al 60 jaroj, t.e. labori malpli por ke ĉiuj laboru, ili pretendas pliampleksigi la deĵordaŭron, okazigante tiel ankoraŭ plian sendungecon.

4. Ĉar la gvidlinio estas ilo por malpliprezigi salajrojn jam formanĝitaj de la vivkosto.

5. Ĉar la pliampleksigo de la deĵordaŭro signifas pliigon de la laco, kio okazos pliigon de problemoj de labora sano kaj de la akcidenteco.

6. Ĉar, dum la registaroj senhonte plenigas sian buŝon per frazumadoj pri la harmonigo de labora kaj familia vivo, la deĵordaŭroj el 10 kaj 12 horoj aliigos la harmonigon de la labora kaj familia vivo al neebla revo, tuŝante unue la laboristi-

nojn.

7. Ĉar la pliampleksigo de la deĵordaŭro estas nepra komplemento de la privatigaj politikoj pri la publikaj servoj, kiuj kuniras la malstabiligon de la laboraj kondiĉoj kaj la malbonigon de la servo.

8. Ĉar ne pravas, ke la gvidlinio ne tuŝos la hispanajn laboristojn. Se ĝi estos aprobata, ĝia frapo estos tuja, kvankam ĝiaj eroj ne estus enigantaj la hispanan leĝaron. Unue la entreprenistoj povos subdungi laboristojn el landoj, kie la deĵordaŭro de 60-65 horoj estos laŭleĝigita kaj ili povos ĉantaĝi nin per minaco delokigi la entreprenojn al landoj, kie la gvidlinio estas valida. Aldone la individuaj entreprenistos ne malfruos apliki ĝin sub protekto de la Eŭropa Tribunalo pri Justico, kvankam la hispana leĝo ne estus modifita, samkiel okazas nun kun la Bolkenstejna gvidlinio. La celo de la eŭropa kapitalismo estas sufiĉe klara: komenci ĉe la landoj kaj sektoroj pli senprotektaj kaj finiĝi per ĝeneraligo de la pliampleksigo de la deĵordaŭro por la novaj generacioj.




9. Ĉar la gvidlinio ne estas izolita fakto sed ĉefa ero de la atako de la eŭropa kapitalo, kiu akompanas la hontigan gvidlinion pri la returniro de la enmigrantuloj, de la Bulonja plano por privatigi la universitatojn, de la Bolkenstejna gvidlinio por liberaligi kaj privatigi la plublikajn servojn, de la senĉesa premo por plialtigi la emeritaĝon kaj por fortranĉi kaj privatigi la publikajn pensiojn.

La Eŭropa Unio montras al ni senĉese sian karakteron de ilo de la eŭropa kapitalismo. Ni estas antaŭ sistemo, kie la teknologiaj antaŭeniroj ne servas por plibonigi la vivkondiĉojn de la civitanaro, sed ili reirigas nin al pasinto de ekspluatado kaj transpasas al la laborista klaso la malfacilaĵojn de krizo, kiun la sistemo mem okazigis post riĉigi al nia kosto.

## Ni riskas multon, nepras 24-horan tuteŭropan ĝeneralan strikon

Nenion ni rajtas esperi el la Eŭropa Parlamento, kiu siatempe aprobis la Hontigan Gvidlinion kaj kiu estas ĉemane de la samaj registaroj, ekplanintaj la gvidlinion pri la 65 horoj. Inter tiuj ekplanintoj estas Berlusconi kaj Sarkozy kune kun la angla Laborista Partio kaj la germana socialdemokratio. La registaro Zapatero, kiu asertas esti kontraŭ la gvidlinio, ne voĉdonis kontraŭ, sed ĝi sindetenis.

Tia agreso postulas frapigan respondon ĉe tuta Eŭropo. La propono de EKS (Eŭropa Konfederacio de Sindikatoj, kiun partoprenis CCOO kaj UGT) estas forfore de tio bezonata. Barbaraĵo kiel tiu ĉi ne estas haltebla per diplomatiaj premoj al eŭroparlamentanoj kaj registaroj, nek per intertraktoj pri “plibonigo” el neintertrakteblaĵo, nek per mobilizoj limigitaj al ceremonia protesto. La agoj de la 7a de oktobro havas sencon nur kiel pretigon de 24-hora ĝenerala striko antaŭ ol tiam, kiam la Eŭropa Parlamento voĉdonos la gvidlinion. Alvoki tiun ĉi ĝeneralan strikon estas devigo de ĉiuj sindikataj fortoj kaj unue de EKS, sur kiu falas la ĉefa respondeco.

Ni postulas al la eŭroparlamentanoj la rektan rifuzon al la gvidlinio kaj ni postulas al la registaro *Zapatero*, se ĝi reale kontraŭstaras ĝin, fari urĝan alvokon fornegi ĝin kaj postuli ties tujan revokon.

# Ne al la 65 horoj! Jes al la 35 horoj!
# Ne al la Eŭropo de la kapitalo!




# EU: maljusta, militema, kontraŭdemokratia kaj neeltenebla

Ekde sia komenco la Eŭropa Unio estas ekonomia projekto, serĉanta unuiĝintan eŭropan merkaton kaj aleksteran influon por siaj plurnaciaj entreprenoj kaj kapitaloj. Nun ĝia celo estas aliiĝi al tutmonda superpotenco.

La Lisbona Traktato, kiu anstataŭas la mortintan Eŭropan Konstitucion, servas tiun celon, ĉar

**Ĝi ŝirmas novliberalan EU-n**. La ekonomia kreskado kaj la konkurenco estas la grandaj celoj de la EU (art. 3 kaj protokolo 6). La Unio laboros por forigi la "barilojn" al libera tutmonda komerco (art. 10A kaj 188B), ĝi garantiigas la liberan kapitalcirkuladon (art. 56 kaj 57-3) kaj vetas pro la liberaligo kaj interligo de la prienergia merkato (art. 1176A).

Aldone la nova strategio de la Unio (Tutmonda Eŭropo: konkuranta ĉe la mondo) postkuras "teni ties konkurencon ĉe la tutmonda merkado per plifortigo de ties streĉoj por krei ŝancojn al ties entreprenoj ĉe triaj landoj. Por konstrui fortajn entreprenojn, la EU devos krei ankaŭ pli favoran medion al la entreprenoj ene de siaj landlimoj".

Per la Ĉarto pri Fundamentaj Rajtoj estas malpliigitaj la sociaj kaj primediaj rajtoj (kiel tiuj pri la laboro, sano aŭ inda loĝejo). Oni malfermas ankaŭ la vojon al la malmuntado de la publikaj servoj, submetante ilin al la konkurencnormoj (art. 86 kaj 87).

**Ĝi estas sunklare kontraŭdemokratia**: La plej riĉaj landoj (Germanio, Francio, Anglio) havos pli gravecon. Oni intensigas la EU-n "el pluraj rapidoj", kie la malpli povohavaj havos ĉiam kaj ĉiam malpli decidka-



pablon. Oni pliampleksigas la kampojn, kie la decidoj estos prenataj el la EU anstataŭ ŝtatnivele. La Konsilantaro kaj la Komisiono tenas la plejmulton el la leĝa kaj plenuma povo, dum la Parlamento daŭre havas subordigitan rolon. La Eŭropa Centra Banko konas neniun demokratian kontrolon.

**Ĝi pliigas la militistan povon de la Unio cele defendi la eŭron**: Oni pliigas la militistan elspezojn (art. 27-3). Oni plifortigas ankaŭ la eŭroarmeojn kaj la apartenon al la NATO (art. 27-7). Aldone oni apogas la "preventajn atakojn" (*Solana* doktrino, art. 28).

Tiu ĉi traktato kongruas kun la stilo de la procezo konstrui EU-n, kio generas agkielon, ĉe kiu:

**La EU detruas la medion**, ĉar ties konstruo implicas distancon ĉiam pli granda inter la produkt- kaj konsumlokoj, kiuj estas interligataj pere de grandaj infrastrukturoj de transporto kaj de energia ligigo. Tio implicas milojn da km$^2$ de terpeco kaj betono, la pliigon de la elsendoj de $CO_2$ al la atmosfero (kiuj okazigas la klimatan ŝanĝon) kaj la detranĉon de la teritorio, kio minacas ankoraŭ pli la biodiversecon.

Aldone la EU estas la dua elsendanto de forcejefikaj gazoj el la planedo, ĉu absolute (24%) kaj pokape.

**La EU pliigas la malegalecojn**, ĉar la kontrolo pri inflacio kaj deficito estas EU-aj celoj sed ne la forigo de la sendungeco kaj la malstabilo. La Unio ne agnoskas la rajton pri universala baza enspezo aŭ tiun pri loĝi indan loĝejon. Aldone al la enmigrantuloj oni ne agnoskas tiel bazajn rajtojn kiel tiujn pri rezido aŭ pri voĉdono.

La ciferoj spegulas tion, ĉar ene de la EU pli ol triono el la aktiva loĝantaro estas ĉe malstabila situacio: 19 milionoj da sendunguloj, 21 milionoj da malstabilaj kontraktoj, 33 milionoj da partaj dungoj kaj ĉiam kreskanta nombro da neleĝaj dungitoj (ĉu enmigrantaj aŭ ne).

Aldone la salajra diferenco inter virinoj kaj viroj estas de 28% kaj la EU deportas aŭ rifuzas 500.000 homojn ĉiujare.

**La EU reduktas la liberecojn**, ĉar ĉe Bruselo estas 15.000 lobiuloj, kiuj premas, por ke la leĝaroj faritaj de la Unio servu la interesojn de la grandaj kapitaloj. Aldone la popola partopreno estas limigita por ebligi, ke la decidoj estu prenataj pli glate.

Fine per alibio pri la terorismo la EU kaj ties ŝtatoj-membroj limigas la liberojn de la loĝantaro.



**La EU estas ĉiam kaj ĉiam pli militista**. Ĉar aperas EU-aj trupoj ĉe pluraj lokoj de la planedo (Libano, Kosovo, Haitio, Sudano, Bosnio...), oni pretigas tutmondan persatelitan lokalizan sistemon (Sistemon "Galileo"), kiu estos milite aplikebla. La eŭroarmeoj estas ĉiam pli provizitaj kaj havas plian aleksteran intervenkapablon kaj estas aprobita la *Solana*-n Doktrinon, laŭ kiu la Unio rajtas interveni milite kie ajn en la mondo por defendi siajn interesojn.

CONFEDERACIÓN GENERAL DEL TRABAJO
Secretariado Permanente
C/ Sagunto, 15, 1º 28010 MADRID
TL. 91 447 57 69 - FAX 91 445 31 32
spccc.cgt@cgt.es www.cgt.es www.rojoynegro.info

# Invito al la renkontiĝo de la ĜKL la 3an de decembro ĉe Madrido

Ricevu elkoran saluton el Ĝenerala Konfederacio de la Laboro (ĜKL - CGT) de Hispanio.

Kiel vi scias, nun okazas tutmonde malbonigo de la vivkondiĉoj de la civitanaro kaj la senĉesaj malprogresoj por la plejmulto el la loĝantaro estas ĉiam pli kaj pli okulfrapaj. Estas dum tiuj momentoj el akra krizo, kiam aperas pli videblaj la sekvoj el la novliberalaj politikoj, kiujn la kapitalista sistemo estas altrudante.

Ĉe la hispana regno la ciferoj iĝas ĉiam kaj ĉiam pli kontraŭdiraj kaj videblaj (sendungeco, akcidentoj, entreprenaj fermiĝoj, plikostigo de la bazaj vivrimedoj ktp). Aliflanke la malforta ŝtata investado en socia politiko kaj la malpliigo de pluraj sociaj servoj okazigas, ke grava parto el la civitanaro troviĝas pli kaj pli senrimeda. La intertrakto pri flekseblo-sikureco, la Bolkenstejna gvidlinio, tiu pri la 65 horoj aŭ tiu pri la returniro (la hontiga gvidlinio) demontras tion.

Kontraŭ tiu ĉi stato nia organizaĵo ekkomencas disvolvi kampanjon el mobilizo. Ni jam realigis ĵuse iujn agadtagojn kaj ni estas daŭrigontaj tiujn per pluraj mobilizoj. Konkrete ni pretigas, kiel unuan tutkonfederacian agon ene de tiu ĉi mobilizkampanjo, renkontiĝon-manifestacion el gedelegitoj de la ĜKL antaŭ la Ministrejo pri Laboro ĉe Madrido la ĉi-jaran 3an de decembro.

Per tiu ĉi letero ni deziras inviti vin partopreni tiun ĉi manifestacion la **3an de decembro ĉe Madrido**. Via ĉeesto estos grava por ni, ĉar ĝi ebligos ankaŭ interŝanĝon el ideoj pri la kielo konstraŭstari efike la draman situacion, kiun travivas la gelaboristoj kaj la popolo entute.

Saluton kaj elkoran brakumon.

Jacinto Ceacero Cubillo
Ĝenerala Sekretaro

**Internacia alvoko al ĉiuj liberecanaj kaj liberecemaj organizaĵoj**